

# La Riverego

Montrealo Verda	2	L'espéranto au Québec	28
Kiel aliĝi al la UK	7	Planlingvoj kaj LangFest	34
Aktivuloj, VEKiĝu!	9	MeKaRo en Kingstono	37
LKK respondas	10	Kristnaskaj Rakontoj	41
Originalaj muzikaĵoj en Montrealo	20	Fotaro	45
Bunta jaro por ESK	24	Eventoj	49



**UK-2020 en Montrealo !**



**Mondial de l'espéranto 2020 !**



# UK-2020 en Montrealo... verda !

*Normando Fleury*

**Montrealo estas la dua plej granda urbo en Kanado post Toronto. Tamen, Montrealo estas multe pli ol brikoj, betono kaj asfalto. Mi invitas vin malkovri ĝian verdan flankon kaj havi iom da antaŭgusto de la kongresa ekskurso Montrealo Verda, kiun ni preparas por vi dum la UK-2020 en Montrealo !**

## **La Reĝa monto, la natura monumento de Montrealo**

En 1535, Jacques Cartier [Ĵak Kartje] supreniris la monton gvidate de indianoj kaj notis : « Monto, de kiu oni havas foran vidon. Ni nomis ĝin la Reĝa monto ». Dudek jarojn poste, la geografo Giovanni Battista desegnis mapon laŭ la indikoj de Cartier kaj indikis Monte Real, laŭ la itala lingvo.

Kunigitaj, la vortoj fariĝis Monreale, kaj la antaŭa nomo Ville-Marie, donita de Maisonneuve [Mezonnev] en 1642, estis ŝanĝita al Montréal (Montrealo) en 1763.

Sed kio estas la deveno de tiu monto meze de la montreala insulo ? Antaŭ longega tempo, magmo supreniĝis subtere, meze de la tiea sedimenta rokaĵo, sen atingi la surfacon. Pro sia kontakto kun tiu varmega magmo, la sedimenta rokaĵo fariĝis ege malmola metamorfa rokaĵo. Venis glaĉeroj, kiuj fariĝis en iuj lokoj du-kilometra glacia tavolo super la grundo. Ili iom post iom erodis la pli molan, ne aliiĝintan, sedimentan rokaĵon situantan super kaj ĉirkaŭ la malmolan metamorfan mason. Kiam fandiĝis la glaĉeroj, proksimume antaŭ 13 mil jaroj, formiĝis super la

tuta regiono granda maro, la maro de Champlain [Ŝamplen] — vidu la bildon. Tiu maro tamen iom post iom multe reduktiĝis (proksimume antaŭ 10 mil jaroj) pro tio, ke la grundo, liberigita de la dikega glacia tavolo, iom post iom altiĝis. Tiel, finfine, estiĝis la insulo Montrealo, kun monto en sia mezo. Estas pluraj aliaj same formitaj montoj en la regiono. Pri ĉio tio vi povas legi sur [ĉi tiu retpaĝo](#) kaj [ĉi tiu](#).

Post la malapero de la priparolita maro, iom post iom la plantoj komencis kreski, kaj tri mil jarojn poste (t.e. proksimume antaŭ sep mil jaroj) la pejzaĝo estis fariĝinta tute alia, kun abioj, betuloj kaj pinoj. Antaŭ kvin mil jaroj la arbaroj atingis maturecon kun aceroj, kverkoj, fagoj. Nuntempaj inventaroj nombris sur la monto pli ol 175 speciojn de birdoj, 20 speciojn de bestoj, kiel sciuro, marmoto, mefito kaj prociono, 65 speciojn de arboj kaj 600 speciojn de plantoj.

### **Kio pri la unuaj loĝantoj ?**

Pli ol mil jarojn antaŭ la alveno de eŭropaj blankuloj, indianoj venis al la monto por trovi

utilajn ŝtonojn, por fari ilojn, sagojn, tranĉilojn. Hochelaga [Oŝlaga] estis unu el la plej grandaj vilaĝoj de Irokezio. La irokezoj uzis lignon kaj betulan ŝelon por konstrui longajn domojn kaj kultivis la grundon por produkti grenon kaj tabakon, sed ankaŭ la tiel nomatajn tri fratinojn :

kukurbon, maizon kaj fazeolon. Je la alveno de Jacques Cartier, ĉirkaŭ 1500 irokezoj vivis en Hochelaga en kvindeko da longaj domoj.

Jaron post kiam Maisonneuve fondis la urbon Ville-Marie, li plantis krucon supre sur la monto. Nuntempe kruco daŭre troviĝas sur la monto, sed kompreneble, ne la tiama.

Dum la 17-a jarcento, pli kaj pli da setlantoj instaligis ĉirkaŭ la monto kaj starigis farmbienojn.

Meze de la 19-a jarcento, riĉaj industriistoj kaj komercistoj aĉetis terenojn por loki siajn luksajn domegojn kaj tiele la bienoj kaj fruktejoj malaperis.

### **Spuroj de Frederick Law Olmsted**

S-ro Olmsted (1822–1903) estas taksata kiel la patro de pejzaĝa arkitekturo en Norda Ameriko.



En 1857, kiam li estis 35-jara, li respondecis pri la kreado de la Centra Parko en Novjorko. Kun siaj filoj li starigis kompanion pri parko-planado kaj oni konsideras, ke ili kune prilaboris pli ol 5 000 projektojn en 44 usonaj ŝtatoj kaj Kanado. La parko ĉe la Reĝa Monto estas inter liaj plej belaj atingoj.

Dum la 1930-aj jaroj estis granda ekonomia krizo kaj multaj personoj fariĝis senlaboraj. Tiam la kebekia registaro donis monon por la tiel nomataj « travaux de chômage », t.e. por laborigi senlaborulojn. Tiel 160 laboristoj mane fosis lagon ĉemonte. Farante tion, ili malkovris malnovajn trunkojn faligitajn de kastoroj, kaj tiel la lago ekhavis sian nomon : la Kastora Lago.

### **Domo Smith**

Hosea B. Smith, komercisto kaj domvendisto, konstruigis vilaon sur la monto en 1858. Kun

ĉevalejo kaj vastaj ĝardenoj, ĝi estis tre impona pro sia situo. En 1872, la urbo Montrealo aĉetis ĝin por 110 000 \$

(ekvivalentaj al pli ol dek milionoj da nuntempaj dolaroj). Ĝis 1940 loĝis en ĝi la parkestroj. Poste ĝi fariĝis policejo (ĝis 1962). Oni uzis ĝin kiel artan centron de 1963 ĝis 1983. Pli poste enestis muzeo pri ĉasado (ĝis 1989). Post renovigado, ekde 1998, ĝi estas la sidejo de la Amikoj de la Monto, fondaĵo, kiu okupiĝas pri la monto. En la domo estas informejo, natura muzeeto kun butikoj, kaj kafejo.


### **Elvidejo Kondiaronk**

Malfermita en 1906 kaj pligrandigita en 1937 kaj 1992, la elvidejo Kondiaronk proponas al la vizitantoj

belegan vidon al la urba centro. Samloke estas vasta konstruaĵo starigita en 1931, nomata simple Monta Ĉaledo. Nepre eniru por vidi, kiel riĉe ĝi estas ornamita.



En somero dekoj da drumistoj kolektiĝas ĉe la monto por kunludi



Elvidejo Kondiaronk

En 1964 okazis en Montrealo internacia skulptista simpozio. Tiel, la reĝmonta parko heredis dekojn da skulptaĵoj el 12 artistoj de 9 landoj.

Jam de 1970, kun le celo protekti la vidon al la monto, estas malpermesate en Montrealo konstrui turon pli altan ol 235 metrojn, por ne superi la monton.

Ekde 1987, la parko estas agnoskita kiel natura historia heredaĵo, kaj ĝi estas severe protektata de la kebekia registaro.

### **Montreala Botanika ĝardeno**

Fondita en 1931, ĝi konsistas el diversaj ĝardenoj kovrantaj 75 hektarojn. Konsiderata inter la tri plej belaj botanikaj ĝardenoj en la mondo, ĝi entenas pli ol nur ĝardenojn.

Kompreneble agrablas promeni tra la 30 ĝardenoj,

kiel la rozejo (dek mil specimenoj), la alpa ĝardeno, la akvo-ĝardeno, la ĉina kaj japana ĝardenoj kun pavilonoj – cetere inter la plej

grandaj tiaj ĝardenoj ekster Azio. Sed krome estas 10 vitraj kreskejoj kun plantoj el dezertoj (kaktoj) kaj tropikaj arbaroj, kun orkideoj (tri mil specimenoj) kaj valoraj – foje plurcent-jaraj – bonsaĵoj. Sume, estas 22 mil specioj de plantoj el ĉiuj kontinentoj.

Kvazaŭ tio ne sufiĉus, troviĝas ankaŭ samloke muzeo pri arboj kaj alia pri insektoj.

La kanada registaro rekonis la altan valoron de la montreala botanikejo per agnosko kiel nacia historia loko en 2007.



### **Biokupolo – Muzeo pri biodiverseco**

Fakte oni povus konsideri, ke la Biokupolo (Biodôme) estas kaj bestejo (zoo), botanikejo kaj

ekologia muzeo pri biodiverseco. Lokita apud la Botanika Ĝardeno, Planetario kaj Olimpika Stadiono, ene de vasta fenestrita konstruaĵo, la Biokupolo prezentos al vi kvin ekologiajn mediojn de Ameriko. Esplorante la muzeon, vi iros de tropika pluvarbaro kun papagoj kaj krokodiloj ĝis polusoj kun pingvenoj. Enestas ankaŭ birdoj, fiŝoj kaj eĉ vespertoj.

### **Biosfero - Muzeo pri natura medio**

En Nord-Ameriko, ĝi estas la sola muzeo dediĉita nur al la natura medio. Ĝia celo estas konsciigi vizitantojn pri la plej gravaj mediaj problemoj, samtempe instigante agadon kaj civitanan partoprenon.

Temas pri arkitektura ĉefverko kreita de la fama usona arkitekto Buckminster Fuller. Ĝi servis unue

kiel usona pavilono dum la Monda Foiro okazinta en Montrealo en 1967 (Expo-67). Situantita en la insula parko Jean-Drapeau [Ĵan Drapo], la muzeo prezentas diversajn ekspoziciojn por pli bone komprenigi la gravajn ekologiajn problemojn pri aero, akvo, biodiverseco, klimataj ŝanĝoj, daŭripova disvolviĝo kaj tiel plu.

### **Parko Jean-Drapeau [Ĵan Drapo]**

Post aŭ antaŭ la muzea vizito, ĝuu la plej vastan parkon en Montrealo (268 hektaroj). Vi povos simple vagadi tra la 25 km da vojoj kaj padoj, bicikli, pikniki aŭ, ĉe la diversaj lagetoj, naĝi, kajaki, boati aŭ kanui.

En 1980, okazis en tiu parko, monda florekspozicio, « Les

Floralies » [Le Florali], kaj postrestis multaj belaj ĝardenoj kun senpaga aliro. Bird-observantoj pli kaj pli iras al la insuloj, ĉar kun la tempo la arboj



Parko Jean Drapeau kaj Biosfero

iam plantitaj multe kreskis kaj nun verdigas la lokon.

Ne maltrafu la okazon iri al la insuloj. Tiel vi vere konscios, ke Montrealo troviĝas meze de la riverego Sankta-Laŭrenco. Cetere, vido al la urbocentro belegas el tiu parko.

Mi menciuj ankaŭ, ke tie okazas muzika festivalo kaj multaj aliaj eventoj somere kaj ankaŭ vintre.

Mi povus daŭrigi longe, skribante pri aliaj parkoj, sed mi lasu vin malkovri ankaŭ la Montrealon historian, kulturan, religian per pluraj dumkongresaj ekskursoj dum la UK-2020 !

### Noto de la redakcio



Normand Fleury estas verdulo... obla ! Prezidanto de LKK por la 105-a UK en Montrealo en 2020, longtempa prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia, patro de du denaskuloj... Normando estis profesia botanikisto (specialisto pri arboj por la urbo Montrealo kaj

Montreala botanika ĝardeno) kaj estas amatora ornitologo. Li gvidos ekskurson Montrealo Verda dum la UK-2020 !

**Fotoj:** Montreala Turismo, Vikipedio.

## Kiel aliĝi al la UK-2020 ?

1) Vizitu la retejon [uea.org/kongresoj/alighilo](http://uea.org/kongresoj/alighilo)

2) Plenigu la retan aliĝilon.

3) Pagu rekte ĉe UEA (kreditkarto, banka ĝiro, UEA-konto aŭ via landa peranto). La landa peranto por kanadanoj estas KEA — Kanada Esperanto-Asocio. Vi povas pagi al KEA per ĉeko, Interac aŭ PayPal en la retejo [esperanto.ca](http://esperanto.ca). Ĝuu la rabaton por fruaj aliĝoj ! (Vidu la kotiztabelon sube).

Infanoj kaj gejunuloj, naskiĝintaj post la 31-a de decembro, nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj, gasto aŭ grava kontribuanto (laŭ aparta interkonsento kun la organizantoj) aliĝas senpage. **Notu ke indas membriĝi (70 CAD) por ricevi la rabatan kotizon.** Se vi aliĝas en 2019, indas aliĝi por **2019** por ricevi la rabaton.

### Bonvenon al Montrealo!

KONGRES-KOTIZOJ VALIDAJ (ĉiuj en eŭroj)	ĝis 2019.12.31		ĝis 2020.03.31		ekde 2020.04.01	
	1-a periodo		2-a periodo		3-a periodo	
Aliĝkategorio	A	B	A	B	A	B
1. individua membro de UEA (ne inkluzivas aligitajn membrojn)	190	145	240	180	290	215
2. ne individua membro de UEA	240	180	300	225	360	270
3. komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA	95	70	120	90	145	110
4. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA	145	105	180	130	215	155

# Subtenu la 105-an UK-on en Montrealo !

Esperantistoj loĝantaj en Kanado (kaj ne nur !) povas signife kontribui al la sukceso de la 105-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo en 2020.

UEA respondecas pri la plejparto de la organizado, ĉar ja temas pri ilia kongreso. Tamen, ankaŭ la Loka Kongresa Komitato (LKK), nome de KEA, respondecas pri pluraj programeroj, ekzemple, nacia vespero, junulara programo, infana kongreseto (parte), enlanda varbado, ekskursoj, antaŭ- kaj post-kongresoj, kaj tiel plu. Tio ja postulos signifan financon apogon de la Movado aŭ de sponsoroj.

Mi donos kelkajn ekzemplojn. Por prezenti profesiajn artistojn kaj indiĝenajn grupojn dum la nacia vespero, por aĉeti ludmaterialojn por la infanoj de la infana kongreseto, por inviti metiistojn instrui, kiel teksu tradiciajn sago-zonojn al junuloj, por inviti dancinstruistojn pri folkloro dancado kaj simile.

Ni ne povas nun diri ekzakte, kiom da mono ni bezonos. Tamen, ni scias, ke ju pli da financa subteno alvenos, des pli riĉa estos la kanada kultura enhavo de la kongreso.

La LKK-o estas vere dediĉita al organizado de plej sukcesa UK-o en Kanado en 2020. Kun via

subteno, ni povos multe pli bone sukcesi kaj fieri pri niaj atingoj. Por donaci, vizitu la retejon de LKK : [esperanto2020.ca/eo/donacu/](https://esperanto2020.ca/eo/donacu/)

Fine, memoru ke Universala Esperanto-Asocio (UEA) ankaŭ

akceptas donacojn favore al partopreno de malriĉaj Esperantistoj en UK. Konsideru ankaŭ donaci monon al la Fondaĵo Partoprenu UK-on 2020.

Sincerajn dankojn,

Normando Fleury, nome de LKK de 105-a Universala Kongreso de Esperanto





# Aktivuloj de Kanado kaj Usono, VEK-iĝu !

Ĉu vi estas 35-jara aŭ malpli kaj ŝatus helpi pri junulara programo en Montrealo-2020 ? Venu al Ĉikago por trejniĝi !

La celo de la evento estas instrui kiel organizi eventojn kaj plani la junularan programon en Montrealo-2020. Oni planas riĉegan programon por junuloj, kun intereseĝaj kaj malmultekostaj ekskursoj, biciklado, pikniko, muziko kaj arto, tabloludoj, sporto kaj pli.

La prezo estas 275 USD kaj stipendioj haveblas kaj por kanadanoj kaj por usonanoj, dank' al speciala kampanjo de ESF kaj Esperanto-USA.

La evento okazos inter la 17-a kaj 20-a de januaro 2020 en Ĉikago.

Por aliĝi vizitu [tinyurl.com/VEK-evento](https://tinyurl.com/VEK-evento)

Atentu ke la kvanto de disponeblaj lokoj estas limigita! **Bonvenon al la teamo de #Esperanto2020 !**

## VINTRA ESPERANTO KLERIGADO



### Kio?

**Nova evento por junuloj** en Usono kaj Kanado, por trejni, subteni, kaj aktivigi la junularon

### Kiam?

17-20 Januaro 2020

### Kiu?

Ĉiaj junuloj  
Aparte bonveniĝas homoj de **historie malavantaĝigitaj grupoj**: homoj de minoritata etno, virinoj, indiĝenoj, GLAT-uloj, homoj denaske parolantaj minoritatan lingvon, necivitanoj, ktp.

### Kie?

Ĉikago, Ilinojso, Usono



### Kiom?

**\$275 USD**  
Stipendioj haveblas per E-USA kaj USEJ. **Stipendioj** ankaŭ povus pagi vojaĝkostojn se necesas.

### Kiel?

Kandidatiĝu ĉe <https://tinyurl.com/VEK-evento>



## Montrealo-2020 : LKK Respondas

### *LKK por la 105-a UK*



La LKK de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en 2020 en Montrealo, venis al Lahtio por reprezenti Montrealon kaj lerni pri kongresa organizado. Demandoj pri Montrealo estis multegaj : ĉe la montreala tablo, dum la Movada Foiro kaj la oficiala prezentaĵo pri la sekvaj UK-oj, en koridoroj kaj rete. Kvankam la kanadaj / kebekiaj legantoj de *La Riverego* kaj *La Lumo* jam scias la respondojn al multaj el tiuj demandoj, ni tamen respondos ilin por la ekster-kanadaj legantoj.

## Kie situas la kongresurbo ?

Montrealo troviĝas ĉe la sud-orienta flanko de Kanado, je la flanko de la Atlantika Oceano kaj tre proksime al la uson-kanada landlimo. Ĝi situas en Kebekio – la ĉefe franclingva provinco de Kanado. Estas rektaj konektoj inter Montrealo kaj ĉiuj grandaj urboj de la mondo, kaj oni atingas Montrealon en proksimume 7-9 horoj de diversaj urboj de Eŭropo.

## Kio estas nia kongresejo kaj kie ĝi situas ?

La hotelo Ŝeraton (Le Centre Sheraton de Montréal) estas nia kongresejo, kaj la plejparto de la programo okazos tie. La hotelo Ŝeraton situas en la koro de la urbocentro, ĉe la kruciĝo de du ĉefaj metrolinioj kaj tuj apud la ĉefa trajnstacidomo (1201, boul. René-Lévesque Ouest, Montréal, Québec, H3B 2L7). Ĝi estas tre facile atingebla de la flughaveno : la flughavena navedbuseto (funkcias tra la tago kaj la nokto) portos vin de la flughaveno ĝis la kongresejo. La kongresejo estas taŭga ankaŭ por personoj kun malfacilaĵoj paŝi, ĉar ĉiuj gravaj ejoj estas en unu loko, kaj estas liftoj kaj movŝtuparoj en ĉiuj etaĝoj.



## Kiuj estas la diversaj loĝebloj en Montrealo ?

Montrealo havas tre diversajn loĝeblojn : de malmultekostaj plurpersonaj ĉambroj en junulargastejoj ĝis la plej ŝikaj elstaraj hoteloj, kaj ĉio inter tiuj. Kompreneble, plej konvene estos loĝi en la oficiala kongresa hotelo, ĉar tio eliminos la bezonon iri aparte al la kongresejo, kaj vi povos pasigi la tutan belan semajnon en Esperantujo, kun amikoj. UEA negocis bonan prezon kun la kongresa hotelo, kaj vi ankaŭ povos dividi la ĉambron kun aliaj



Teraso por loĝanto de Ŝeraton : loĝi en la kongreshotelo = pasigi tutan semajnon en Esperantujo !



La hotelo Ŝeraton estas tiu konstruaĵo en la mezo kun la litero S

esperantistoj, kaj tiel malgrandigi la koston. Baldaŭ UEA anoncos la liston de oficialaj hoteloj kun la prezoj.

### **Kiom kostas aĉetaĵoj en Montrealo ?**

Ĝenerale, unu kanada dolaro valoras malpli ol unu eŭron aŭ unu usonan dolaron, do, la prezoj en kanadaj dolaroj favore kompariĝas kun la prezoj en Eŭropo aŭ Usono (en la momento de la skribo, unu kanada dolaro valoris 68 eŭrocendojn aŭ 75 usonajn cendojn). Por doni ekzemplon, por havi kompletan pladon en rapidrestoracio estos 7-15 kanadaj dolaroj, kompleta manĝo en restoracio koston ĉ. 15-25 kanadajn dolarojn (kompreneble, prezoj varias multe). Biero en trinkejo koston ĉ. 5-

10 kanadajn dolarojn, kafo / kapuĉino 1,5- 4, filmo en kinejo 13-15. Apud la kongresejo troviĝas ankaŭ diversaj manĝaĵvendejoj, kaj la prezoj de varoj estas ne tro altaj (multe pli malaltaj ol en la nordeŭropaj landoj, ekzemple).

### **Ĉu estas multaj manĝebloj apud la kongresejo ?**

Manĝejoj apud la kongresejo abundegas ! La kongresejo situas apud la fama montreala « subtera urbo » : reto de vendejaroj, restoracioj, butikoj, ligitaj kun ĉiuj ĉefaj metrostacioj. En diversaj partoj de la « subtera urbo » troviĝas multaj tre variaj kaj malmultekostaj rapidmanĝejoj. Apud la kongresejo estas multaj

oficejaj konstruaĵoj, kaj somere ofte laborantoj de la oficejoj tagmanĝas en la parkoj apud la kongresejo. Ankaŭ ekstere estas multaj belaj restoracioj kun terasoj kaj ofte ili proponas vegetarajn kaj veganajn opciojn. Kaj, kompreneble, estas bonega restoracio de la hotelo mem.

### **Kiom da loĝantoj havas Montrealo?**

Kun pli ol miliono da loĝantoj, Montrealo estas la plej granda urbo de Kebekio – kun la ĉirkaŭurbo, ĝi kunigas ĉirkaŭ duonon de ĝia loĝantaro, pli ol 4 000 000 da personoj – kaj la due plej granda de Kanado, post

Toronto. Montrealo tamen longe estis la plej granda kaj riĉa kanada urbo. Situante ĉe la kunfluo de la riverego Sankta-Laŭrenco kaj de la rivero Otavo, sur insulo, kiun ĝi dividas kun aliaj

municipoj, ĝi estis fondita en 1642, proksime al la monteto nomita Reĝa Monto (Mont-Royal, de kiu devenas la nomo « Montréal »). Kvankam ĉirkaŭ mil kilometrojn for de la Atlantika oceano, ĝi tamen estas alirebla por oceanaj ŝipoj.



Montrealanoj ŝategas pucinon. La kebekia specialaĵo, manĝaĵo el terpom-fritoj garnitaj per grajnfromaĝo kaj bruna saŭco, troveblas en multaj lokaj restoracioj. Okazas eĉ pucino-festivalo en Montrealo.

### **Kiun temperaturon oni povas atendi ?**

La kongreso okazos inter la 1-a kaj la 8-a de aŭgusto, kaj la averaĝa temperaturo en aŭgusto estas inter 17 kaj 26 gradoj (povas esti iom pli aŭ malpli). Ĝenerale, someroj en Montrealo estas belaj : mezvarmaj kaj malsekaj, kun foje varma kaj malseka aero. Do, vestiĝu por somero, sed tamen ne forgesu vian

pluvombrelon kaj puloveron : mallongaj posttagmezaj pluvoj estas oftaj somere.

### **Ĉu Montrealo estas sekura urbo ?**

Kanado estas ĝenerale tre sekura lando, kaj Montrealo estas unu el la plej sekuraj grandaj urboj de Nord-Ameriko. La krima nivelo estas malalta kaj estas ĝenerale sekure promeni nokte.

## Ĉu verdaj spacoj troveblas en la urbo ?

Montrealo havas multajn parkojn, du el kiuj situas tuj apud la kongresejo. Per dudek-minuta piedirado ekde la kongresejo, oni povas atingi kaj la grandegan parkon ĉe la monto Mont Royal – la Reĝa Monto (kiu donis la nomon al la urbo), kaj la riveregon Sankta-Laŭrenco. Per mallonga metroa veturado oni ankaŭ povas atingi du belegajn insulojn de Montrealo kun ĉarmaj parkoj kaj eĉ plaĝo.

## Kial « Haleluja » estis la invita kanto al la UK ?

Ĉar ĝia aŭtoro, Leonard Cohen, naskiĝis kaj kreskis

en Montrealo. Dum diversaj kongresaj aranĝoj vi konatiĝos kun lia arto, kaj kun la arto de aliaj famaj kanadaj kaj kebekiaj artistoj, per prelegoj, filmoj, ekskursoj ktp. *(klaku sur la bildon por spekti la invitvideon por Montrealo)*



## Ĉu oni povas pagi karbonimposton por kompensi la veturadon per aviadilo ?

Jes ! La montreala kongreso fariĝis la unua kongreso, por kiu oni povas pagi karbonimposton per UEA. Ni ankaŭ intencas efektiviĝi

diversajn aliajn iniciatojn por fari nian kongreson eĉ pli verda kaj ekologia.

## Ĉu estas laŭleĝe aĉeti kanabon en Montrealo ?

Jes, en Kanado de iom da tempo kanaboproduktojn eblas laŭleĝe aĉeti, nur en malmultaj registaraj vendejoj, sed ĝia fumado estas

malpermesita en multaj lokoj, foje eĉ surstrate aŭ en publikaj parkoj. Ankaŭ tabakfumado estas malpermesita en publikaj internaj lokoj kaj apud ili, inkluzive de la kongresejo. Estas strikte malpermesate elporti aŭ enporti kanabajn produktojn el aŭ al Kanado.

### **Kion oni devas fari por iri al Kanado ? (vizioj, ktp.)**

La reguloj pri vizonado malsamas laŭ devenlando, do, esploru. La plejparto de la homoj bezonas aŭ vizon, aŭ elektronikan vojaĝpermesilon (AVE - franclingve / eTA - anglalingve). Pri vizo zorgu sufiĉe frue, kaj la

elektronikan vojaĝpermesilon eblas peti kaj ricevi rete iom da tempo antaŭ via foriro. Se vi bezonas vizon, vi povas peti invitleteron de UEA ĉe la aliĝo. Notu, ke dokumento permesanta viziti Usonon ne donas rajton viziti Kanadon, nek reciproke : ne estas libera irado inter la du landoj, eĉ por iliaj civitanoj. Pli da informoj pri ĉio ĉi estos havebla en la Dua Bulteno.

### **Ĉu Montrealo estas bona por piedirado kaj biciklado ?**

Jes kaj jes ! Kelkaj ĉefaj stratoj en Montrealo fariĝas tute promenaj stratoj. Vi povas ankaŭ lui urban biciklon.



La Reĝa Monto — plej granda parko en la urbo Montrealo (ĉ. 20 min de la kongresejo)



Ikonaj montrealaj kurbaj ŝtuparoj — videblaj en ĉiuj loĝkvartaloj de la urbo

## **Ĉu oni povas tendumi apud la kongresejo ?**

Ne – tendumejoj estas, sed ekster la urbocentro, kaj ne proksime al la kongresejo. Tamen, estos diversaj ebloj loĝi malmultekoste.

## **Kien celas la ekskursoj ?**

Estos tre belaj antaŭ-kaj postkongresoj – inkluzive de la fama Niagara akvofalo, Toronto (la plej granda kanada urbo), Otavo (la ĉefurbo), Kebeko (ĉefurbo de Kebekio, unu el la plej malnovaj kaj belaj urboj en Norda Ameriko), la regiono Charlevoix (Monda Biosfera Rezervejo de Unesko). Ni multe ekskursos en Montrealo mem – ĉar la urbo havas tiom da historiaj lokoj, muzeoj, belegaj preĝejoj kaj parkoj. Atendu la Duan Bultenon por ĉiuj detaloj !



## **Ĉu dumkongrese oni ankaŭ konatiĝos kun diversaj indiĝenaj kulturoj de Kanado ?**

Absolute ! La UK en Montrealo celos ankaŭ konatigi la vizitantojn kun diversaj indiĝenaj

kulturoj de Montrealo, Kebekio kaj Kanado per diversaj programeroj, prelegoj, vizitoj al indiĝena vilaĝo, kaj filmoj faritaj de indiĝenaj filmfaristoj. Krome, samtempe kun la UK en Montrealo okazos indiĝena festivalo, kiu estos brila okazo konatiĝi kun indiĝenaj artoj, muziko, dancoj ktp.

## **Kio estos aparta pri la programo de la UK en Montrealo ?**

Ni planas riĉan artan programon – vi revidos konatajn artistojn kaj konatiĝos kun novaj talentoj en Esperantujo. Dum la Nacia Vespero vi konatiĝos kun diversaj kulturoj, kiuj kreis



Montrealon, inkluzive de la indiĝenaj. Ni havos teatron, ludojn kaj amuziĝojn, kaj riĉegan neformalan kaj junularan programon, kun biciklaj ekskursoj, pikniko, noktaj amuziĝoj ktp.

## Kie oni informiĝu pri la UK ?

Kiel ĉiam, la detalaj informoj pri loĝado, ekskursoj ktp. aperos en la Dua Bulteno, kaj la reta aliĝilo troviĝas ĉe <https://uea.org/kongresoj/alighilo>. La retejo de la LKK havas multajn aldonajn informojn pri la kongreso, urbo ktp. : [esperanto2020.ca](http://esperanto2020.ca) (ĝi ankaŭ havas



En la sama semajno kiel la UK okazos la trideka eldono de Indiĝena Festivalo — estos koncertoj, atelieroj, dancoj kaj eĉ parado de indiĝenaj nacioj !

volontulan kaj kontribuan formularon). Sekvu nin plu ĉe sociaj retoj : Facebook ([facebook.com/Montrealo.kongreso](https://facebook.com/Montrealo.kongreso)), Twitter kaj Instagram (@esperanto2020), kaj helpu al ni reklami la UKon en viaj grupoj. Nia oficiala kradvorto estas #Esperanto2020 !

Kun modifoj (unue aperis en revuo *Esperanto*).

[Prezentaĵon de la LKK en Lahtio](#) | [Haleluja : invito al Montrealo](#) | [Intervjuo de la LKK al Kern.Punkto](#)

## Kebekio : aparta kultura kaj historia realo

Kvankam la franca kaj la angla estas la oficialaj lingvoj de Kanado, la franca estas tiu de Kebekio, la plej vasta provinco de Kanado, kun ĉirkaŭ 8,5 milionoj da loĝantoj, ĉefe el franca deveno. Tiel multaj kebekianoj konsideras sin aparta nacio. La historio de Kebekio komenciĝis en 1608, kiam fondiĝis Kebeko, la unua urbo de la tiam Nova

Francio. En 1763, la franca kolonio iĝis brita sekve de milito. La franca nun estas la gepatra lingvo de 79 % de la kebekianoj kaj estas komprenata de 94% el ili. Estas ankaŭ 11 indiĝenaj popoloj en Kebekio, konsistigantaj 2,3 % de la loĝantaro. Iuj el ties lingvoj estas tre uzataj, sed aliaj ne plu aŭ apenaŭ estas parolataj.

# Kortuŝa momento: Haleluja!

## *Ĵenja Amis*

Por mi persone la plej kortuŝa momento de la 104-a UK en Lahtio okazis dum la Internacia Arta Vespero. Kiel la lasta ero de la Internacia Arta Vespero okazas, tradicie, la invito al la sekva kongresa urbo, kaj tiu invita kanto estis la kanto « [Haleluja](#) », amata kanto de Leonard Cohen, mondfama montreala poeto kaj komponisto, traduke de Ĵomart.

Piane akompanis Jeremio Bass (mem kanadano !), kaj ni kantis aranĝon por kvar voĉoj. La koruson el trideko da volontuloj gvidis Zdravka Bojĉeva. Por la lasta refreno Zdravka petis, ke ĉiuj aŭskultantoj kunkantu



« Haleluja »-n kun la koruso. La publiko bele faris. Post la fino kaj la riverencoj, la kongresanoj mem, spontene, komencis kanti « Haleluja »-n.

Zdravka revenis kiel dirigento kaj reprenis la gvidadon, kaj la koruso ree kantis « Haleluja », feliĉa ke la publiko petis kanti denove. Estis mirinda sperto.

Inter la kantistoj estis tri kanadaninoj : du LKK-anoj, Suzano Roy el Tririvero kaj Ĵenja Amis el Montrealo. Kantis ankaŭ Maria Hopkins, el la okcidenta flanko de Kanado (Brita Kolumbio).

## Vi faras videon, ni donas 100 eŭrojn kaj premion ĝis 500 eŭroj

Antaŭnelonge UEA anoncis filmo-konkurson *Mia Asocio, Mia Urbo*, por diskonigi Esperanto-asociojn kaj lokajn kulturaĵojn. UEA decidas disdoni 100 eŭrojn kiel subvencion por ĉiu el la unuaj ricevitaj 10 filmoj, kaj ĉiuj filmoj kolektitaj havas ŝancon gajni premiojn. Por partopreni en la konkurso necesas sendi mallongan (2-10-minutan) filmon kun subtekstoj pri (ekzemple) sia Esperanto-asocio kaj pri la kulturaĵoj de sia urbo. Necesas sendi ankaŭ artikolon kun informoj pri la asocio kaj la urbaj kulturaĵoj kun ilustraj bildoj aŭ fotoj, ĝis la 15-a de decembro. La tri plej bonaj filmoj ricevos tre interesajn premiojn :

1. Senpagan aliĝon al la Universala Kongreso en Montrealo, kie oni prezentos la premiotajn filmojn (aŭ repagon de la aliĝkotizo, se tiu jam estis pagita);
2. Loĝadon en hotelo dum la daŭro de la kongreso;
3. Partan repagon (ĝis 500 eŭrojn) de la vojaĝo. La premioto, kiu ne povos ĉeesti la kongreson, rajtos alimaniere uzi la premian sumon.

Bonvolu vidi la Gazetaran Komunikon de UEA por la detala regularo de la konkurso: [uea.org/gk/822a1](http://uea.org/gk/822a1)

## Medalo por la UK-2020

La LKK por la 105-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo volus presi memormedalon de la UK. Tamen, por ke ni ne faru malprofiton, ni devas pli malpli scii antaŭe, kiom da medaloj ni kredeble povos vendi. Se vi interesiĝas pri la aĉetado de tia medalo, bv sendi mesaĝon al Garry Evans, kasisto de la LKK : [garryoevans\(ĉe\)gmail.com](mailto:garryoevans(ĉe)gmail.com). Ne estos devige aĉeti medalon, sed via mesaĝo donos al ni pli precizan ideon, kiom da medaloj vendiĝos. La medalo estos el polurita arĝentita bronzo, kun diametro de 38 mm, kaj aspektos kiel la ĉi-afiŝitaj desegnaĵoj. Ĝi kostos 60 kanadajn dolarojn (aŭ 45 usonajn dolarojn, aŭ 42 eŭroj) por ĉiu ekzemplero, inkluzive de luksa skatoleto, plus poŝtaj kostoj (sed sen tiaj kostoj, se vi kolektos la medalon dum la UK). Vi eventuale povos pagi pere de PayPal aŭ al nia UEA-konto.



# Du poemoj de Émile Nelligan muzikigitaj por la UK en Montrealo

## *Trefflé (Trefleo) Mercier*


**La 105-a Universala Kongreso okazonta en Montrealo en 2020 enhavos multajn allogaĵojn, interalie la projektitan inaŭguron de du poemoj de la plej fama kebekia poeto, Émile Nelligan, liberverse tradukitaj al Esperanto de Trefflé Mercier kun sugestoj de Sylvain Auclair kaj François Lorrain, muzikigitaj de la plej konata Esperanto-komponisto de nuntempa klasika muziko, David Gaines, kaj interpretitaj de la Internacia Esperanto-Koruso.**

## Émile Nelligan

Émile Nelligan naskiĝis la 24-an de decembro 1879 en Montrealo kaj mortis la 18-an de novembro 1941 en la sama urbo. Li suferis de skizofrenio kaj devis esti internigita en psikiatran hospitalon iom antaŭ sia dudeka jaraĝo, kie li restis ĝis sia morto. Liaj junaĝaj poemoj estis publikigitaj en gazetoj kaj kolektivaj verkoj; ili aperis la unuan fojon kiel poemaro danke al lia amiko kaj mentoro, Louis Dantin. La muzikeco

de la versoj de Nelligan ja estas la plej rimarkinda aspekto de liaj poemoj. La ĉefaj temoj pritrakitaj estas: infanaĝo, frenezeco, muziko, amo, morto kaj religio. Nelligan estas konsiderata kiel la elirpunkto de la moderna kebekia poezio, rompanta kun la patriota temaro de sia epoko cele al esplorado de lia interna spaco. Nelligan inspiris popularajn kantojn, filmojn, pentraĵojn, teatraĵojn kaj eĉ lastatempe unu operon.

## *La ora ŝipo (Le vaisseau d'or)*



Ĉi tiu soneto estis verkita en 1899, probable post la kunveno de la 26-a de majo de la Literatura Skolo de Montrealo (École littéraire de Montréal) dum kiu Nelligan ricevis ovacion post esti leginta *La romance du vin*. *La ora ŝipo* estas la plej konata poemo de Émile Nelligan, tiu kiun li deklamis plej ofte al siaj vizitantoj post sia interniĝo, kvankam kelkfoje kun gravaj misoj.

### ***La ora ŝipo (Le vaisseau d'or)***

Estis granda Ŝipo farita el masiva oro:  
Ĝiaj mastoj tuŝis la lazuron, sur nekonataj maroj;  
La ama Ciprino, kun senordaj haroj, nudaj haŭtoj,  
Sterniĝis ĉe ties pruo, sub ekcesa suno.

Sed frapis ĝi iun nokton la grandan rifon  
En la trompa Oceano kie kantis la Sireno,  
Kaj la terura ŝiprompo klinis ĝian karenon  
En la profundon de l' Abismo, senŝanĝa ĉerko.

Estis Ŝipo farita el oro, kies diafanaj flankoj  
Rivelis trezorojn pri kiuj la profanaj maristoj,  
Naŭzo, Hato kaj Neŭrozo, disputis inter si.

Kio restas el ĝi en la mallonga ŝtormo?  
Kio fariĝis mia kor', forlasita ŝipo?  
Ve! Ĝi pereis en la abismon de l' Revo! ...

Fonto: Wikisource

### **La romanco de l' vino (La romance du vin)**

Estis dum la kvara kaj lasta publika kunveno de la Literatura Skolo de Montrealo, kiu okazis en la fama Château de Ramezay, la 26-an de majo 1899, ke Émile Nelligan legis *La romance du vin*. Kiam li finis la legadon, li estis varme aklamita. Lia amiko kaj mentoro, Louis Dantin, priskribas la laŭtegan

triumfon de Nelligan per tiuj vortoj: “Mi vidis Nelligan iun vesperon en plena gloro... Kiam per flama okulo kaj vastigita gesto pro la intima strebado, li deklamis per pasia voĉo sian *Romance du vin*, aŭtenta emocio strangolis la salonon, kaj la aplaŭdoj prenis la furoron de ovacio.” Tiu poemo restis gravurita en la memoro de la kebekianoj, ĉar estis la lasta publike legita antaŭ lia internigo en psikiatran hospitalon.

### ***La romanco de l' vino (La romance du vin)***

Ĉio miksiĝas en viva brilo de verda gajeco.  
Ho, la bela maja vespero! Ĉiuj birdoj ĥore,  
Kaj ankaŭ la antaŭnelongaj esperoj de mia kor',  
Modulas sian preludon je mia malfermita fenestro.

Ho la bela maja vespero! la gaja maja vespero!  
Fora orgeno eksplodas en fridajn melopeojn;  
Kaj la radioj, kiel purpuraj spadoj,  
Boras la koron de l' tago kiu mortas parfumita.

Gaja estas mi! gaja estas mi! En la kristalon kiu kantas,  
Verŝu, verŝu la vinon! verŝu ankoraŭ kaj ĉiam,  
Por ke mi forgesu la tristecon de l' tagoj,  
En la disdegno kiun mi havas pri la malica homamaso!

Gaja estas mi! gaja estas mi! Vivu la vino kaj l' Arto!..  
Mi revas fari ankaŭ famajn versojn,  
Versojn kiuj ĝemigos la funebrajn muzikojn  
De l' aŭtunaj ventoj fore pasantaj en la nebulo.

Jen regas l' amara rido kaj la furiozo  
Scii sin poeto kaj celo de malestimo,  
Scii ke oni havas koron kaj estas komprenata  
Nur de l' lunbrilo kaj de l' grandaj fulmotondraj vesperoj!

Virinoj! trinkas mi je vi kiuj primokas la vojon  
Kien vokas min l' Idealo malfermante siajn rozajn brakojn;  
Trinkas mi ĉefe je vi, viroj kun morozaj fruntoj  
Kiuj disdegnas mian vivon kaj forpuŝas mian manon!

Dum la tuta lazuro stelpleniĝas en gloro,  
Kaj ke himno ekkantas je ora renoviĝo,  
Pri la mortanta tago mi do ne ploris,  
Mi kiu marŝas blindopalpe en mia nigra juneco!

Gaja estas mi! gaja estas mi! Vivu la maja vespero!  
Estas mi freneze gaja sen esti ebria!..  
Ĉu pro tio ke mi fine estas feliĉa vivi;  
Ĉu finfine resaniĝis mia kor' post ami?

La sonoriloj kantis; la vespera vento odoras...  
Kaj dum la vino fluas en ĝojaj torentoj,  
Tiom gaja estas mi, tiom gaja, en mia sonora rido,  
Ho! tiom gaja ke mi timas ekploregi!

Fonto: *Poésies complètes*, Fides Montrealo, 1952

## David Gaines

David Gaines estas komponisto de nuntempa klasika muziko. Li naskiĝis en 1961 kaj loĝas en Vaŝingtono, D.K. Li verkis la unuan orkestran simfonion, kiu uzas tekstojn en Esperanto. Li verkis ankaŭ ĥoran kanton, *Povas Plori Mi Ne Plu*, kiu temas pri la iama militsituacio en Bosnio kaj Hercegovino. Tiu kanto gajnis la unuan premion *An Ok San* ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA en Tamperejo en 1995. Li estas



ankaŭ prezidinto de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono, D.K., kaj UEA-delegito por tiu urbo. D-ro Gaines doktoriĝis sub la komponada fako de la Peabody-Konservatorio de Muziko en Baltimoro, Usono. Lia Esperanto-simfonio haveblas kompaktdiske registrita de la Moravia Filharmonia Orkestro de Ĉeĥio; Vit

Micka, dirigento, kaj Kimball Wheeler, mezosoprano. Lia movada aktivado realiĝas precipe ene de Muzika Esperanto-Ligo, en kiu li havas la postenon de Honora Prezidanto. David entuziasmiĝis pri la du ĉi-supraj poemoj de Nelligan kaj projektas

muzikigi ilin por ke ili estu prezentitaj de la Internacia Esperanto-Koruso dum la 105-a UK en Montrealo.

## Trefflé (Trefleo) Mercier



Trefleo profesie tradukas de pli ol 40 jaroj. Lia plej grava defio en Esperanto estis traduki en 2019 la klasikan kanadan romanon *Maria Chapdelaine* de Louis Hémon. Ĝi tiam ankoraŭ ne estis tradukita al

Esperanto, kvankam ĝi ekzistas en dekduo da lingvoj. Trefleo nuntempe priesploras la eblecon eldonigi sian tradukaĵon. Li ankaŭ tradukis en Esperanton aliajn historiajn tekstojn de aŭtoroj kiel Lionel Groulx kaj Honoré Mercier (praulo lia), krom ekstraktojn de romanoj por la estonta Kanada Antologio (Michel Tremblay, Arlette Cousture, Yves Thériault) kaj subtitolojn de indiĝenaj filmetoj prezentotaj dum la montreala UK en 2020.



## Lunebriiĝo

*Stéphane Brault*

La vin' per la vid' trinkita  
Verdlume de l' lun' defluas,  
Kaj sub ĝia ŝaŭmo dronas  
La horizonto silenta.

Delogado trompkonsila  
En l' eliksir' serpentumas.  
La vin' per la vid' trinkita  
Verdlume de l' lun' defluas.

La poeto, homo pia,  
Per la likvor' ebriiĝas,  
Kaptite de l'absinta nas',  
Geste kaj pense freneza  
Pro l' vin' per la vid' trinkita!

# Prezidanta raporto por 2018-2019

Nicolas Viau, ESK-prezidanto

ESK bonfartas, samkiel Esperanto en Kebekio ĝenerale. Restas malpli ol unu jaro antaŭ la UK, la plej grava Esperanto-evento planita iam ajn en Montrealo, Kebekio kaj Kanado ! Tio, espereble, donos al Esperanto novan videblecon kaj kuraĝigos lokajn aktivulojn, lernantojn kaj interesitojn agi por kaj per Esperanto antaŭ, dum kaj post la Universala Kongreso.

## Agado de ESK

### Kunvenoj

- Ni daŭre kunvenas en Végo (ankaŭ progresantoj !) kaj la partoprenantaro ŝajne daŭre estas relative multnombra.
- Okazas regulaj kunvenoj en Kebekurbo, nun en Le Bonnet d'Âne (dankon al Suzano ankoraŭ !).
- Biblioteka vespero ĉe Martin Morris estis sukcesega
- Sukcesis ankaŭ jen plia Jarfina festo en itala



Montreala biblioteka vespero, novembro 2018

- restoracio (dank' al Normando).
- Ni kunokazigis MeKaRon en Kingstono.
- Garry afable reakceptis helpi pri Paralela Universo, kiu okazis apud la Kanada Muzeo pri Arkitekturo
- Kebekiaj kaj Kanadaj aktivuloj partoprenis ARE-n, eĉ se pluraj ne povis veni ĉi-jare.



Televidea elsendo pri la Trivera Esperanto-domo



## Nova kunveno: Esperanto-domo en Trivero

Mi dankas al Suzano Roy pro sia iniciato starigi novan Esperanto-domon, konvene mezvoje inter Montrealo kaj Kebekurbo.

## Komunikiloj

Ni daŭre uzas Meetup, nun plene apogate de KEA, por Montrealo kaj Kebekurbo. Tio okazos almenaŭ ĝis la UK (la rezultoj estis iom seniluziigaj ĝis nun).

- Ni daŭre efike uzas Facebook-on por anonci kunvenojn.
- Estas jam la dua jaro por la renovigita

Paralela Universo en Montrealo, aŭgusto 2019



RiveReto (dankon al Silvano)

- Okazas belaj eldonoj de *La Riverego* (dankon al Ĵenja), sed ĉu 2020 estos la lasta jaro de ĝi en la nuna formo ?

## Novaĵoj pri Esperanto en Kebekio

### Amaskomunikiloj kaj intervjuoj

- Esperanto aperis plurfoje en lokaj medioj - televide kaj en ambaŭ franca kaj la angla lingvoj !
- Aperis du artikoloj en Radio Canada International (france kaj angle) pri la UK

- Normando aperis en la novaĵelsendo dum LangFest ĉe Radio-Canada (eĉ kun arkivaj bildoj !)
- Elsendo pri la UK en Lahtio kaj Montrealo-2020 aperis en 24/60 ĉe RDI (Nicolas)
- Oni ankaŭ parolis pri la UK en Breakfast Television (Joel kaj Nicolas)
- Aperis raporto en Radio-Canada pri la malfermo de la Tririvera Esperanto-domo (Suzano).
- Ĉio ĉi ankaŭ helpis al LangFest.



Vidu ĉiujn elsendojn ĉi tie :

[esperanto2020.ca/eo/pri-ni-gazetaro](http://esperanto2020.ca/eo/pri-ni-gazetaro)

## LangFest

- Okazis jam kvara eldono de LangFest (Montreala Lingva Festivalo). Esperanto-budo estis starigita kun apogo de KEA kaj ESF, samkiel pasintjare. Ĉi-foje ĝi okazis en nova

loko (UdeM). Pli kaj pli da homoj scivolemas pri la UK. Aperis anonco en la kongresa libreto. Dankon al Ĵenja, Joel, Garry, Normando kaj Suzano, kiuj deĵoris !

- Suzano gvidis atelieron por progresantoj !
- Oni parolis pri Esperantecaj temoj – interkompreniĝo inter lingvoj, socia prestiĝo de lingvoj, lingvolernado, indiĝenaj lingvoj. Aktivuloj povis fari kontaktojn.

## UK 2020

- Eblas aliĝi !
- Efika komunika strategio. La Unua Bulteno aperis unu jaron antaŭe ol kutime – estis budo ne nur en Lahtio en 2019, sed ankaŭ UK en Lisbono la jaron antaŭe, plus vaste diskonigita Facebook-paĝo.
- La retejo de LKK – [esperanto2020.ca](http://esperanto2020.ca) – bone funkcias !
- ILEI-kongreso progresas – ĝi okazos semajnon antaŭ la UK en Kebekurbo, dank' al helpo de

Suzano Roy

- Oni planas okazigi Nitobe-simpozion lige al la UK

**Dankoj** : Tuta estraro. Silvano (RiveReto, financoj), Normando (estrado de LKK), Zdravka (libroj, volontuloj), Ĵenja (*La Riverego*, LangFest, grafikigo de la anonco), Garry (Paralela Universo), Suzano Roy (kunvenoj en Montrealo kaj Kebekurbo, nova Esperanto-domo), la tuta LKK-teamo kaj venontaj teamanoj.



Montreala tatuaj-stacio furoris en Lahtio !



Kelkaj LKK-anoj por Montrealo-2020 : bela teamo



# L'espéranto au Québec

**Nicolas Viau, prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia (kaj unu el la vicprezidantoj de LKK por UK Montrealo), respondas la demandojn de Espéranto-France pri Esperanto en Kebekio por la inform-letero Esperanto-Aktiv, kadre de serio pri Esperanto en franclingvujo. La intervjuo unue aperis en la retejo de [Espéranto-France](#).**

**Esperanto-Aktiv' : Bonjour, pouvez-vous vous présenter en quelques mots ?**

**Nicolas Viau :** Nicolas Viau, président de la Société québécoise d'espéranto et vice-président du Comité organisateur local (Loka Kongresa Komitato) pour le Congrès mondial d'espéranto qui aura lieu à Montréal en 2020. Je parle espéranto depuis une dizaine d'années, mais suis assez actif depuis 2013 environ. Né à Paris, je suis arrivé au Québec à l'adolescence et j'y vis depuis maintenant près de deux décennies. Professionnellement, je suis responsable des projets spéciaux dans

une PME spécialisée en technologies des énergies renouvelables. Je m'intéresse par ailleurs beaucoup aux langues, ce qui a en partie motivé mon intérêt pour l'espéranto et m'a aussi amené à m'impliquer dans un événement pour passionnés des langues ayant eu lieu à Montréal depuis 2016, le *Festival des langues de Montréal* ou *LangFest*.



Nicolas Viau donante intervjuon al Radio-Canada

**EA : Pouvez-vous présenter votre association ?**

La Société québécoise d'espéranto (SQE ou Esperanto-Societo Kebekia - ESK) actuelle a été fondée en 1982 (d'autres associations ont toutefois existé avant sa fondation) et

visé à faire connaître l'espéranto et à promouvoir son utilisation au Québec. L'histoire de l'espéranto au Québec remonte toutefois au début du 20<sup>e</sup> siècle et a connu différentes « vagues ».

Elle coexiste par ailleurs avec l'Association canadienne d'espéranto (Kanada Esperanto-Asocio ou KEA), qui couvre l'ensemble du Canada (sans oublier les clubs locaux présents dans différentes villes canadiennes).

### **EA : Que faites-vous pour faire connaître l'espéranto ?**

Des rencontres régulières sont organisées régulièrement à Montréal, Québec et d'autres villes, notamment à l'occasion du *MeKaRo* (*Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto*), rencontre annuelle ayant lieu chaque année en mai, alternativement au Québec et en Ontario (province canadienne voisine).

Les rencontres régulières visent tant les apprenants que les espérantophones expérimentés. Une Maison de l'espéranto vient par ailleurs d'être ouverte par Suzanne Roy à Trois-Rivières, ville située à mi-chemin entre Montréal

et Québec, le long du fleuve Saint-Laurent. (Certains se souviendront peut-être de l'ancienne Montreala Esperanto-Domo - grâce à cette initiative, la SQE « retrouve » une maison !)

### **EA : Que faites-vous pour trouver de nouveaux membres et de nouveaux bénévoles ?**

Nous essayons de communiquer et

d'annoncer toutes nos activités régulièrement non seulement sur notre site web (<http://www.esperanto.qc.ca/>), mais aussi par les réseaux sociaux notamment Facebook (ainsi que Meetup).

Nous essayons aussi d'informer les médias autant



que possible et sommes toujours ouverts aux reportages et entrevues.

Cette année a d'ailleurs été particulièrement riche en reportages (télévisés notamment), la venue du Congrès mondial d'espéranto à Montréal étant une excellente occasion de parler de l'espéranto.

Nous espérons que l'événement saura susciter la curiosité tant du grand public que des journalistes. Pouvoir y participer est aussi une source de motivation pour les apprenants et nouveaux espérantophones.

De plus, la SQE, de manière générale, souhaite soutenir les initiatives locales et individuelles, ainsi que les propositions de soutien de ses membres et amis.

### **EA : Quels sont vos moyens de communication ? (site internet, evues/magazine... ?)**

Tel que mentionné plus haut, nous avons un site web et sommes actifs sur les réseaux sociaux. La SQE publie régulièrement une revue (au contenu essentiellement en espéranto) appelée *La*

*Riverego (Le Fleuve*, référence au fleuve Saint-Laurent), grâce au travail exceptionnel de sa rédactrice en chef Yevgeniya (Ĵenja) Amis et de toutes les personnes qui y contribuent.

Nous avons aussi une lettre d'information électronique mensuelle appelée *La RiveReto*, qui rappelle au début de chaque mois les activités à venir.

Depuis quelques années, nous utilisons aussi des dépliants, produits avec l'appui de KEA, inspirés du format des excellents petits calendriers produits par Espéranto-Jeunes, ainsi que des marque-pages.

Quant aux bénévoles, ils communiquent par courriel, Messenger et autres.



Nous essayons aussi d'être présents là où ça compte, par exemple en montant un stand et en proposant des conférences lors de la venue du *Forum social mondial* à Montréal en 2016, ou encore, depuis 2017 - et avec l'appui de KEA, de l'Esperantic Studies Foundation et d'Esperanto-USA - en installant une table de présentation de

l'espéranto au *LangFest* (que j'ai eu le plaisir de coorganiser) à Montréal, permettant à des bénévoles locaux de rencontrer des participants souvent polyglottes et curieux des langues, sans oublier les divers ateliers et présentations liés à l'espéranto qui y ont été proposés aux participants. C'est une manière de trouver des publics intéressés.

### **EA : Quelles sont les difficultés que vous rencontrez ?**

Les difficultés sont à mon sens de deux ordres.

Tout d'abord, comme dans de nombreuses organisations bénévoles, les bonnes idées peuvent être nombreuses, mais leur réalisation se heurte au manque de moyens humains.

Mon autre commentaire, d'ordre plus général, est qu'il n'est pas toujours facile de trouver le bon message (concis de préférence) pour susciter

l'intérêt, particulièrement dans un contexte où la plupart du temps, les personnes approchées n'ont jamais entendu parler de l'espéranto ou du concept de langue construite auxiliaire internationale. Ce peut être un inconvénient,

puisque cela rallonge l'explication, mais peut d'une certaine manière aussi se révéler bénéfique : contrairement à certains endroits, où une connaissance assez vague du nom « espéranto » et du concept général peut souvent être accompagnée de préjugés, il est possible d'informer les gens de manière plus positive

et plus juste lors d'un tel premier contact avec la langue.

Je pense aussi qu'il faut faire prendre conscience aux gens des enjeux de rapports de force (économiques, politiques, culturels) liés aux langues, qui font implicitement partie du message



porté par l'espéranto. Le Québec, îlot francophone dans une Amérique du Nord anglophone, est à ce titre un terrain assez réceptif à ce type d'argument. C'est d'ailleurs ce genre de réflexions qui m'avaient personnellement incité à m'initier à l'espéranto il y a une dizaine d'années.

**EA : Quelles sont vos plus belles réussites, les projets dont vous êtes le plus fier ?**

Ces dernières années, je crois que les espérantistes montréalais, québécois et canadiens se sentent très fiers d'avoir réussi à faire en sorte que Montréal soit choisie comme ville pour le Congrès mondial d'espéranto de 2020.

Je crois que nous avons aussi bien amélioré nos façons de communiquer (usage plus systématique des réseaux sociaux, site web rénové, liens avec d'autres organisations, etc.). On peut dire que ces

efforts ont constitué l'un des principaux axes des activités de la SQE (et du LKK du Congrès de 2020) au cours des quatre ou cinq dernières années.

Plus généralement, la SQE et le mouvement au

Québec peuvent être fiers de ce qui a été accompli collectivement au cours des années, notamment à l'initiative de Normand Fleury, très longtemps président de la Société, ainsi que de

nombreux autres bénévoles, depuis sa fondation (p. ex. IJK en 1992, TAKE en 2008, des livres et bien plus).

**EA : Merci beaucoup d'avoir répondu à nos questions.**

Nedankinde ! :) Venez découvrir Montréal lors du Congrès mondial d'espéranto l'année prochaine !





# Salutmesaĝo de la Ambasadoro de Kanado en Finnlando, S-ro Jason Tolland, okaze de la 104-a UK en Lahtio, Finnlando

Okaze de la 104-a Universala Kongreso de Esperanto en Lahtio, Finnlando, mi elkore salutas ĉiujn el la pli ol 800 partoprenantoj, kiuj reprezentas Esperantoparolantojn el preskaŭ 60 landoj, kaj aparte al la anoj de la kanada delegacio.


La deveno de Esperanto rezultis el deziro konstrui pontojn inter diversaj lingvaj kaj kulturaj komunumoj kaj kunigi homojn. Tiuj estas celoj, kiuj troviĝas ĉe la koro de diplomatio kaj spegulas fundamentajn valorojn alte estimatajn de kanadanoj. Do estas mia plezuro kiel Ambasadoro de Kanado en Finnlando scii, ke Montrealo gastigos

la 105-an Universalan Kongreson en aŭgusto 2020 ! Kune kun la ĉefministro de Kanado, la

honorinda Justin Trudeau, la registaro de Kebekio kaj la urbo Montrealo, mi bonvenigas vin ĉiujn al la venontjara kongreso. Mi ŝatus gratuli la organizantojn de la ĉi-jara kongreso en Lahtio pro via sindediĉo al la daŭrigo de tiu ĉi histori plena tradicio. Mi deziras al ĉiuj agrablan kaj riĉigan semajnon ĉi tie en Finnlando. Kaj ĝuu la veteron!

Jason Tolland

Ambasadoro de Kanado  
en Finnlando





# LangFest 2019 : Planlingvoj furoris !

*Nicolas Viau*

Ĉi-jare okazis de la 23-a ĝis la 25a de aŭgusto la kvara eldono de LangFest, Montreala festivalo por ĉiuj lingvemuloj, unuafoje en Universitato de Montrealo post tri jaroj ĉe Universitato Concordia.

Pri kio temas ? LangFest estas aranĝo, kiu enhavas kaj prelegojn kaj sociajn eventojn por kunigi homojn ĉirkaŭ lingvolernado kaj ĉiuspecaj lingvaj temoj : lingvopolitiko, malplimultaj lingvoj, lingvoj kaj arto, lingvoj kaj profesioj, kaj multe pli. Ĉi-jare aparte grava estis la temo planlingvoj (temo, kiun pluraj ĉeestantaj esperantistoj certe ŝatis).

La ĉefaj prelegantoj estis du gravaj lingvokreantoj : David J. Peterson kaj Marc Okrand. La unua estas la kreinto de la artaj dotrakia kaj altvaliria lingvoj, la dua estas la kreinto de la klingona lingvo de la famega

televizseriaro Star Trek. Dum grava prelego – kune unuafoje sursceneje ! – ambaŭ ili priskribis sian lingvokreivan procezon. Du plej malsamaj lingvistoj, el du malsamaj generacioj, kaj du sufiĉe malsamaj spertoj ! Unu kvazaŭ rakontis la

lingvokrean procezon de la alia kaj komentis.

Sed tiuj ne estis la solaj reprezentantoj de la planlingvaro. Apud tiuj artaj lingvoj, esperantistoj ankoraŭ, la trian fojon, strebis prezenti sian lingvon kaj la rolon de ĝi kiel internacia komunikilo, per budo starigita ĉi-jare, same kiel pasintjare, danke al la

malavara apogo de la Kanada Esperanto-Asocio kaj de Esperantic Studies Foundation. Estis bela okazo reklami ankaŭ pri la UK... oni nuntempe ne povas mencii Montrealon sen mencii tiun gravan okazontaĵon en nia urbo, kiu ŝajne ekvekas interesiĝon pri la lingvo de Zamenhof, eble eĉ ĉe homoj, kiuj eble ne lernus ĝin alimaniere.



Marc Okrand kaj David Peterson (meze)

Ankaŭ estis la tria fojo, kiam oni prezentis Esperantan atelieron (kaj mi ne enkalkulas la diversajn Esperantecajn prelegojn, kiuj estis prezentitaj dum LangFest laŭ la jaroj), ĉi-foje por iom pli spertaj studentoj, kiuj havu almenaŭ bazon pri la lingvo. Suzanne Roy ankoraŭ brile gvidis ĝin, per gesta metodo taŭga por parolantoj de la plej diversaj lingvoj.

Aparte interese por Esperanto kaj ties parolantaro kaj amikaro estis ankaŭ laŭ mi la prelego de la ekonomikisto (kun aparta emo al lingvaj temoj) Kai Chan, kiu demandis sin, ĉu la angla (tiu alia internacia lingvo) estas tro pova en la mondo. Tion li faris uzante, interalie, la ekzemplon de Montrealo kaj la ilon (la Indicon de povaj lingvoj), kiun li kreis antaŭ kelkaj jaroj ĝuste por « kvante » taksu tiujn temojn.

Ankaŭ menciindaj estis la prelego de Marc Pomerleau, esploristo kaj instruisto pri tradukscienco en Universitato de Montrealo. Li prelegis pri interkompreniĝo inter la latinidaj lingvoj – aŭ ene de lingvaj familioj ĝenerale, en

kiuj la lingvoj estas sufiĉe proksimaj unu al la aliaj, tiel ke oni povas facile atingi komprenon de alia, kiam oni jam parolas unu. Estas maniero atingi la celojn de interlingvo kiel Esperanto... ĝuste sen interlingvo !

Malplimultaj lingvoj kaj lingvaj rajtoj estas proksimaj al la koro de multaj esperantistoj kaj lingvemuloj : tiuj certe ŝatis la prelegojn pri la oĝibva (ni memoru, ke 2019 ja estis deklarita jaro de la indiĝenaj lingvoj de la UN) kaj bretona lingvoj.

Jen kelkaj aliaj eroj de la bunta programo : lingvoj kaj skribarto, lingvaj registroj kaj lingvolernado, la mitoj pri signolingvoj, lingva konkurso kaj eĉ malstreĉiĝa ateliero en apuda parko por pli bone ĝui la eventon, ĉar sinsekvo de enkondukoj al pluraj

lingvoj ja povas esti sufiĉe streĉa afero. Inter aliaj interesaj novaĵoj ni aldonu, ke ĉi-foje la eventanoj povis elŝuti poŝtelefonan apon, kiu enhavis la horaron, priskribojn de prelegoj kaj ĉiujn informojn pri la evento – ĉio ĉemane !

LangFest estis ankaŭ komunika sukceso. Estis pluraj radiaj intervjuoj ĉe Radio-Canada/CBC Mike



FM kaj eĉ ĉi-foje televida intervjuo ĉe loka anglalingva Montreala kanalo Breakfast Television, kun niaj famaj gastoj S-roj Peterson kaj Okrand – ekzakte semajnon, post kiam Joel Amis kaj mi mem intervjuiĝis pri Esperanto, de la samaj ĵurnalistoj !

S-ro Jean-Benoît Nadeau, eble konata de pluraj en Kebekio, kiuj interesiĝas pri lingvoj kaj la franca aparte (kaj kiu prelegis en 2016 ĉe la tiama LangFest – la nordamerika poliglota simpozio), verkis belan artikolon pri la evento kaj la plurlingvismemo de Montrealo. Laŭ li tiu plurlingvema fakto ne estas sufiĉe valorigita ĉi tie, ĉar Montrealo ja estas vere pli plurlingva ol multegaj lokoj en la kontinento – ĝuste laŭ mi pro la « franca fakto ».

Kaj ni ne forgesu, ke unu el la plej gravaj atingoj gazetaraj estis la veno de la Télĵournal de Radio-Canada dum LangFest... Sed la temo estis... Esperanto. Nia tre konata kaj longdaŭra aktivulo kaj amiko Normando Fleury, kiu partoprenis la eventon unuafoje, parolis pri Esperanto kaj la

sperto fondi Esperantlingvan familion kun sia edzino Zdravka. Radio-Canada eĉ elfosis arkivojn de televida raporto de 1987 tiuokaze, en kiu vidiĝas pluraj Esperantistoj de la epoko !

Kaj dimanĉe venis la fino... sed Esperantistoj havis la lastan vorton. Tradicie oni prezentas aliajn poliglotaĵojn dum la malferma ceremonio, sed ĉi-foje la evento estis konkludita per invito en

la franca, angla... kaj Esperanto partopreni la Universalan Kongreson !

La UK kaj Montrealo atendas kaj bonvenigas ĉiujn lingvemulojn. Pluraj volas reviziti nian urbon. Ni preparu por ili venontjare la plej belan okazon ! Notu, ke kvankam venontjare ne

okazos LangFest en Montrealo, la evento kunlaboros kun Polyglot Conference, kiu okazos en Meksiko en oktobro 2020. Polyglot Conference mem okazos de la 16-a ĝis la 18-a de oktobro 2020. LangFest okazigos socian aranĝojn tuj antaŭ kaj post la konferenco, tiel ke partoprenantoj povos lingve lerni kaj amuziĝi de la 14-a ĝis la 19-a de oktobro 2020. [montreal.langfest.org](http://montreal.langfest.org)



Klaku por spekti videon de E-tablo

# MeKaRo-2019 en Kingstono :

## Mez-Kanada Renkontiĝo tra la okuloj de Letisja kaj Riano

### *Lætitia Bert*

La semajnfino de la 18-a de majo okazis MeKaRo (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto) en Kingstono, Ontario. Tiu tri-taga renkontiĝo estis okazo por esperantistoj kune turismi kaj renkontiĝi. Mi tre ĝojis revidi delonge ne renkontitajn amikojn kaj konatiĝi kun novaj.

Mi veturis tien kun Joĉjo (usonano) kaj Marko (franco), el Tririvero. Tiel la vojaĝo komencis en bonfreneza etoso kun multaj ridoj kaj ŝercoj. La vojo surprize ne ŝajnis tiom longa, dum ni aŭskultis klingonan muzikon en la aŭto !

La plejmulto de la ĉeestantoj loĝis en la studenthejmo de Kingstono, sed mi gastis ĉe tre interesa kaj afabla duon-irana familio de Suzano la 2-a.

Je nia alveno, ni renkontiĝis en la studenthejmo antaŭ ol promenadi en la malnova anglastila urbo. Ĉu vi sciis, ke iam Kingstono devis esti la kanada ĉefurbo ? La proksimeco kun la usona landlimo malebligis tion, sed la urbo ja konservis tiun potencon historian stilon.



MeKaRumantoj en Kingstono

Mi tre ĝuis la arkitekturon kaj organizadon de la urbo, kiu tre malsimilas al la urbo Kebeko. Plie estis agrabla varma vetero, kaj la stratoj jam floris, dum tiel ankoraŭ ne estis en Tririvero.

Vespere ni longe babilis en la « stujmo » kaj ludis diversajn ludojn. Ŝajne la Esperanta skrablo estigis debaton pri kreado de Esperantaj vortoj, dum alia

grupo, en, kiu mi estis, vigle homlupis.

La venontan tagon, ni iris al la kluzoj de Kingston

Mills, vizitis muzeon, iom promenadis, kaj aŭskultis interesan ĉiĉeronon, kiu rakontis pri la vivo de la laboristoj tie kaj la utileco de tiuj kluzoj. Estis okazo revii pri plurtagaj boataj kaj biciklaj ekskursoj laŭlonge de bela rivero inter Otavo kaj Kingstono kaj iom sunumi.

Postagmeze ni ĝuis longan ŝippromenadon al la « Mil Insuloj ». La esperantistoj povis laŭprefere sunbaniĝi sur la ferdeko, aŭskulti muzikon en la kelo aŭ lerni pri tiuj insuloj ĉe la pruo dank' al registrita ĉiĉeronado kun stranga malnovstila akĉento. Ni eĉ havis ŝancon aŭskulti kelkajn maristajn kantojn en la franca kaj en Esperanto !

Post la ŝippromenado, ni vespermanĝis en bierfarejo, kie mi havis okazon pli bone konatiĝi kun la organizanto de tiu MeKaRo, Gregorio. Mi tre ŝatis diskuti kun li pri Esperantaj radikoj, evoluo de la lingvo kaj denaskismo. Kion vi opinias, ĉu oni povas rajdi buson ? Kaj kiun vorton

ni uzu, « sunsubiro » aŭ « krepusko » ?

Lunde matene, ni vizitis la historian fortikaĵon Henry, 19-jarcentan britan militistan konstruaĵon. Aktoroj vivigis la lokon per trejnadoj kaj muziko.



En la historia fortikaĵo Henry

Nia ĉiĉerono, edzino de soldato en longa tiama robo, rakontis al ni pri la vivkondiĉoj en tiu militista fortikaĵo. Kompatindaj soldatoj !

Bedaŭrinde ni havis longan vojon kaj devis forveturi post la vizito. Mi tre ĝuis

tiun tri-tagan semajnfino en regiono, kiun mi ne konis, kaj kun interesaj personoj. La etoso estis bona kaj ni bele turismis.

### *Ryan Callahan*

La unua tago estis tre bona tago, ĉar oni povis renkonti amikojn, kiujn oni eble ne vidis ekde unu jaro aŭ pli ! Ĉar MeKaRo estas en oportuna loko, multaj Esperantistoj el Kebekio, Ontario kaj



Novjorkio povis veni. Aldone alvenis Esperantistoj el okcidenta Kanado kaj la usona ŝtato Vermonto.

Post la kunveno en la komuna salono de la studentejo de la bela kaj moderna universitato Queen's, la 16-a MeKaRo, aŭ Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto, komenciĝis kun turisma promenado je bona vetero tra la urbocentro. Aparte interesaj estis la vizito de la Kortumo Frontenac kaj la urbodomo de Kingstono.

Bonŝance, post tiom da marŝado, ni havis la ŝancon verspermanĝi kune ĉe la Red House. Sed por pluraj Esperantistoj ĉi tio ne estis la fino de la vespero. La unuan vesperon organiziĝis grupo por

ludi ludojn en Esperanto – bona okazo por amuziĝi kun amikoj kaj uzi Esperanton en kunteksto neofta.

La dua tago komenciĝis per vizito de Kingston Mills, kiu estis nomumita Monda Kulturheredaĵo. Ni povis lerni kaj babili en Esperanto, kio estis riĉiga sperto por mi. La situo estis certe inspira. Kiel multaj lokoj en la regiono, ĝi portas historian signifon, ĉefe pro militoj. Sed kiel la lando, en kiu ĝi troviĝas, ĝia rolo en la mondo transformiĝis tra la jarcentoj kaj hodiaŭ, ĝi generas hidroelektron por la loĝantaro de Kingstono.

La organizintoj elektis bonan semajnfinojn por MeKaRo, ĉar mojosa merkato okazis sur la centra placo de Kingstono dum la dua tago. Oni povis trovi librojn, memoraĵojn kaj dekoraciojn por la domo. La loka loĝantaro estis akompanata de turistoj el la tuta mondo – mi aŭdis la hispanan, la germanan kaj la francan inter la budoj. Sur la ĉefa placo ankaŭ montriĝis afiŝaĵoj pri la efikoj de la klimata krizo de nia jarcento kaj kiel la urbo kaj la lando agas kontraŭ ĝi. Mi ekhavis la impreson, ke Kingstono reflektas la opinion de sia enloĝantaro, kiu volas agi por savi la naturon.

Ekde la 14-a horo ni ĝuis krozadon sur la riverego Sankta-Laŭrenco, kie ni povis vidi la tiel nomatajn « mil insulojn », kie ni povis sunbruniĝi, drinkumi inter Esperantistoj ĉe la landlimo inter Usono kaj Kanado kaj admiri la belajn domegojn kaj neloĝatajn insulojn. La krozado estis bonega aldono al la programaro de MeKaRo.

Bedaŭrinde, ĉio havas finon. Nia fina tago komenciĝis kun vizito al Fortikaĵo Henry, perfekta loko por lerni pri la du fondintaj nacioj de Kanado, ĉar la fortikaĵon origine konstruis la Francoj. Post la brita konkero de Kanado, ĝi transformiĝis en strategian lokon por defendi Britan Nordamerikon. Ni lernis, ke Kingstono ludis grandan rolon en la frua 19-a jarcento. La urbo estis valora por defendi la kanalon Rideau de la

Usonanoj. Nuntempe ĝi servas la publikon kiel muzeo kaj kiel Nacia Historia Loko de Kanado. Post la gvidata vizito ni retrovis nin en restoracio por manĝi baratan kuiradon, kiu sufiĉe novas en Kanado – sed kiu same tre bongustas.

Kingstono estas ĉarma urbeto : la promenebla urbocentro, kiu bordas je la akvo, la historieco kaj la kvanto da junuloj faris el ĝi bonegan elekton por MeKaRo, tiel ke ni povu lerni pri Kanado en la pasinteco kaj pri la Kanado de hodiaŭ – bonveniga loko por personoj el la tuta mondo, kiu reinventas sin por plibonigi la vivon de siaj enloĝantoj. Mi estas dankema esti havinta la okazon partopreni en mia

dua MeKaRo kaj antaŭĝojas la venontan.



Du artlingvuloj ekzercas sin pri la lingvo...  
kreita de sia kunparolanto !



Tra Mil Insuloj



# Kristnaskaj Rakontoj: “En neĝostormo”

*Louis Fréchette*

el la rakonto “En neĝostormo”, el Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado, Montrealo, Esperanto-Societo Kebekia, 2013, p. 48–49.

[...] ni reeniris la neĝveturilon, kaj, dum ni varme volvis nin en la “robojn” [t. e. en peltajn kovrilojn], la veturigisto vigle vipis siajn ĉevalojn, kiuj ĵetis sin antaŭen, nazbruante, tra la ventopelata neĝo.

La gastejestro ja pravis; post malpli ol horo, ni blinde antaŭeniris sur nevetureblaj vojoj, en plena mallumo, envolvataj en tia neĝhajla torento, kian neniu vidinta neniam la samon povas imagi. Ni supreniris perpendiklajn krutaĵojn, sur kies suproj niaj ĉevaloj apenaŭ povis stari kontraŭ la vento, kaj poste ni devis malsupreniri en faŭkantajn abismojn, flankatajn de gigantaj abioj, kie la kompatindaj bestoj preskaŭ malaperis en la kirliĝanta neĝo.

Kompreneble, ni ne povis iri pli rapide ol paŝon post paŝo; kaj, gvidate per nura instinkto, niaj ĉevaloj, lacegaj kaj blindigataj de algluiĝintaj hajleroj, pene plu stumblis kun pendaj kapoj, spiregante.

“Ĉu ni revenu malantaŭen?” mi demandis al la veturigisto. “Evidentas, ke ni apenaŭ povas plu antaŭeniri.”

“Malantaŭeniri!” ekkriis la kompatinda homo, kiu ŝajnis amare bedaŭri sian antaŭnelongan fanfaronadon; “estas tro malfrue, sinjoro; mi estas tiel blinda, kiel miaj ĉevaloj; se reveni malantaŭen, ni riskus maltrafi la vojon, kaj, kun la vojo maltrafita, mi ne donus kvin cendojn por niaj tri haŭtoj.”

La kuracisto nenion diris.

Nia situacio fariĝis senespera; ni povis nek malantaŭeniri, nek restadi en la sama loko, ĉar la vetero terure malplivarmiĝis, kaj, spite niajn dikajn peltojn, ni estis frostigitaj ĝis la ostoj. Ni povis nur antaŭeniri — ĉiuriske antaŭeniri. [...]

Aĉetu la libron en la retejo de Esperanto-Societo Kebekia : [www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj/](http://www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj/)

Louis FRÉCHETTE

## Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado



Kun la originalaj ilustraĵoj de  
Frederick Simpson COBURN

ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA

## ***Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado : papere aŭ elektronike!***

Ses kristnaskaj rakontoj de [Louis FRÉCHETTE](#) [lui freŝet] (1839–1908), unu el la gravaj franckanadaj verkistoj de la 19a jarcento. 130 paĝoj, kun nigraj-blankaj ilustraĵoj de la kanada pentristo [Frederick Simpson COBURN](#) (1871–1960). Publikigis tiun esperantlingvan eldonon Esperanto-Societo Kebekia en 2013.

« [...] *la beleco, la facileco de la lingvaĵo, la sincera homamo, kiu elradias el la noveloj, faras el la libro de Fréchetle idealan donacon – ne nur kristnaskan – al ĉiunivelaj esperantistoj.* » (Eugene de Zilah, La Gazeto, novembro 2014).

« *Aventuro, pioniroj, neĝostormoj, glaĉeroj, riveroj, situacioj en kiuj la naturo estas malamika kaj malgastama : jen la ĉefaj ingrediencoj de la ses rakontoj, ĉiuj tre ĝuindaj kaj engaĝaj.* » (Sara Spanò, Literatura Foiro, aŭgusto 2015).

Kristnaskaj Rakontoj estas ideala kristnaska donaco por viaj amikoj-esperantistoj, aŭ vi mem ! Aĉetu paperan aŭ elektronikan eldonon per la retejo de Esperanto-Societo Kebekia : [www.esperanto.qc.ca/](http://www.esperanto.qc.ca/eo/eldonaĵoj/)  
[eo/eldonaĵoj/](http://www.esperanto.qc.ca/eo/eldonaĵoj/)

Papera eldono 23 CAD (kanadaj dolaroj) plus sendokostoj, elektronika eldono 14 CAD.

# Malpli oftaj fundamentaj vortoj 10

## Francisko Lorrain

Iam kaj tiam oni renkontas fundamentan radikon, kiun ni povus pli ofte uzi. Jen la oka ero de kroniko prezentanta ĉiufoje kelkajn malpli ofte uzatajn fundamentajn radikojn. La difinoj kaj ekzemploj estas ĉerpitaj el *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* (Paris, Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu markas ĉiujn fundamentajn vortojn per stelo ★. Komentoj miaj aperas inter rektaj krampoj [ ]. Alta <sup>Z</sup> indikas zamenhofan citaĵon aŭ vorton.

★ **falbal/o** Larĝa rubando aŭ ŝtofostrio krispe alkudrita je la malsupro de robo, jupo, subjupo, por ĝin ornami: *puntoj, por ĉirkaŭkudrado de ~oj<sup>Z</sup>; mult~aj jupoj de ciganinoj.* ☞ *garnaĵo.*

★ **fals/i** (tr) Elfari ion malveran kaj doni ĝin kiel veran, por tiri el tio profiton, k speciale : **1** Imite reprodukti valoran originalon per malpli valora materialo: *~i oron<sup>B</sup>, bankbiletojn, monerojn; ~i vinon, lakton;* (analoge) *~i ies subskribon; ~ita fabrikmanko.* **2** En aŭtentikan tekston enmeti aŭ forigi pecojn, tiel ke la signifo aŭ valoro estas ŝanĝita : *~i testamenton, ĉekon (ŝanĝante nomojn aŭ ciferojn); ~i la daton de akto; ~ita evangelio, epistolo; ~i la leĝon, la historion; oni poste ~is la sencon de miaj vortoj<sup>Z</sup>.* ☞ *interpoli.* **3** Kaŝe aranĝi objektojn, por trompe gajni: *~i la pezilojn; ludi per ~itaj kartoĵoj (sekrete markitaj), per ~itaj ĵetkuboj (ne ekvilibraj).* ~o. Ago de falsanto k ties rezulto : *miaj paroloj ne enhavas falson<sup>X</sup>.* ~a **1** Prezentanta mensoge k perfide la eksteran

aspekton de la vero [...] **2** Prezentanta artefaritan imitaĵon, kiu iel donas la iluzion de la vero [...] [**Ne uzu la formon « ~igi » anstataŭ « ~i » !**]

★ **farm/i** (tr) Lue preni laŭ kontrakto por difinita tempo teron, bienon, por ĝin kulturi kaj uzi je sia propra risko k profito : *~i je duono* (donante al la proprietulo la duonon de ĉiu rikolto). ☞ *ekspluati.* ~o **1** Tia maniero de ekspluatado : *hereda<sup>Z</sup>, tempa<sup>Z</sup> ~o; havi en ~o<sup>Z</sup>.* **2** ~a bieno. ~a. Regata de tia kontrakto. ~anto. Persono, kiu farmas bienon. ~igi. Kontrakte doni por ies uzado sian bienon, terpecon ks. ~iganto. La proprietulo. ~isto. ~anto. ~obieno **1** Bieno ~a. **2<sup>Z</sup>** Kulturbieno. ~odomo **1** La domo de la ~anto. **2<sup>Z</sup>** Bieneta domo. ~opago. Pago, el mono aŭ naturproduktoj, kiun la ~anto ŝuldas al la ~iganto. [**Atentu, ke Zamenhof mem uzis la vortojn « ~obieno » kaj « ~odomo » en la ĝeneralaj sencoj « kulturbieno » kaj « bieneta domo », ĉe kiuj la bieno ne nepre estis luprenita !**]

(daŭrigota)

## Esperantistoj ĉe la Tago de UN en Kebeko

Tri esperantistinoj : Suzano Roy, Lætitia Bert kaj Tamara Koziej ĉeestis gravan UN-eventon en Kebekurbo : la Tagon de UN 2019 ! Dank' al ilia ĉeesto (interalie) s-ino Sylvie Damours, Ministro pri Indiĝenaj Aferoj de Kebekio (meze sur la unua foto) kaj s-ro Thierry Kininga, prezidanto de ACNU-Québec (Association Canadienne pour les Nations Unies) eksciis pri Esperanto. Ni memoru, ke la temo de la UK-2020 estas UN 75-jara : Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo.





Multaj kongresanoj en Lahtio ricevis Montrealan tatujaĵon !





Dum la oktobra vizito de Duncan Charters, Prezidanto de UEA, kaj Clay Magalhães, Konstanta Kongresa Sekretario









# Esperanto-renkontiĝoj

11—18 julio 2020 : IJK

Somereno, Nederlando ([www.tejo.org](http://www.tejo.org))

25-julio —1- aŭgusto 2020 : ILEI-konferenco

Kebeko, Kanado ([www.ilei.info](http://www.ilei.info))

1 — 8-a de aŭgusto 2020 : UK

Montrealo, Kanado ([esperanto2020.ca](http://esperanto2020.ca))

1 — 8-a de aŭgusto 2020 : IJK

Montrealo, Kanado ([bertosch.free.fr/iik2020](http://bertosch.free.fr/iik2020))

8 — 10 aŭgusto 2020 : Nitobe-simpozio

Montrealo, Kanado ([esperantic.org](http://esperantic.org))

10—12 oktobro 2020, ARE

Silvero, Usono ([www.are-esperanto.org](http://www.are-esperanto.org))

## Montrealaj Esperanto-Kunvenoj

Ni renkontiĝas la duan kaj la lastan\* vendredon de la monato, vespere, krom dum la somero. La renkontiĝoj okazas en la restoracio Resto Végo (suba saloneto) : [1720 rue Saint-Denis](#), metroo « Berri-UQAM ». Manĝo je la 18 h, babilado ekde 19:30 h. Speciale por lernantoj, Suzanne Roy foje okazigas ludecajn paroligajn kursojn, inter la 18:00 kaj la 19:00 en la sama tago, en la kafejo La Récréation, 404 rue Ontario Est. Post la paroliga kurso la grupo pluiras al Resto Végo. Bonvolu kontroli nian horaron ĉe la retejo de ESK : [esperanto.qc.ca/eo/kalendaro/](http://esperanto.qc.ca/eo/kalendaro/) aŭ vizitu nian FB-paĝon : [facebook.com/EsperantoQuebec](https://facebook.com/EsperantoQuebec). Kontrolu ilin ankaŭ por vidi la datojn de renkontiĝoj en Kebeko !

\* kutime la lasta vendredo estas la kvara vendredo de la monato, sed, se estas kvin vendredoj en la monato, ni renkontiĝas la kvinan vendredon.

## Rencontres d'espéranto à Montréal

Les rencontres ont lieu les deuxième et dernier\* vendredis de chaque mois, sauf pendant la période estivale. Le lieu des rencontres est le Resto Végo (petit salon en bas) : [1720 rue Saint-Denis](#), métro Berri-UQAM. Souper à 18 h, discussions à partir de 19 h 30. Spécialement pour les débutants, Suzanne Roy parfois anime des cours de conversation ludiques, de 18 h à 19 h, le même jour, au café La Récréation, au [404 rue Ontario Est](#). Après le cours de conversation, le groupe rejoint celui du Resto Végo. Veuillez vérifier le calendrier sur le site de la SQE: <http://www.esperanto.qc.ca/fr/calendrier/> ou notre page FB: [facebook.com/EsperantoQuebec](https://facebook.com/EsperantoQuebec) (pour Montréal ou Québec).

\* Le plus souvent, le dernier vendredi du mois est le quatrième, mais, s'il y a cinq vendredis dans le mois, la rencontre a bien lieu le cinquième.

# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko** : Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair, Francisko Lorrain, Bob Williamson. **Estraranoj de ESK** : Nicolas Viau (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Joel Amis (konsilanto), Normand Fleury (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme** : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair, François Lorrain, Bob Williamson. **Administrateurs de la SQE** : Nicolas Viau (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Joel Amis (conseiller), Normand Fleury (conseiller).

**Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2020.01.20**

**6595, rue Briand, Montréal H4E 3L4 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Vizitu nian retejon !**

**Visitez notre site web !**

[www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)



Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :

**[www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org)**

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.

# Atendu la sekvan eron de Rivereg-er-aro baldaŭ!

Intertempe, helpu al ni reklami la 105-an UK-on dividante tiun ĉi eldonon kun viaj amikoj : en Facebook kaj aliaj sociaj retoj, retpoŝte aŭ legante en via klubo, kaj... jes, aliĝu !

[Aliĝoj : UEA](#) | [Facebook](#) | [Instagram](#) | [LKK-retejo](#) | #Esperanto2020



**Redaktado kaj grafiko** : Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca).

**Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain.

Esperanto-Societo Kebekia : [esperanto.qc.ca](http://esperanto.qc.ca) | Kanada Esperanto-Asocio : [esperanto.ca](http://esperanto.ca)